
Vi lernos:

Repasado, Opinioj

- 1 Ĉu estas vere, ke nun pluvas?
- 2 Ĉu estas fakto, ke tro da alkoholaĵoj ne estas bona por la sano?
- 3 Ĉu vi konsentas kun la verkisto de la BEKkurso, ke oni devas praktiki multe por lerni Esperanton?
- 4 Ĉu vi samopinias kun Pablo kiam li diras, ke ĉiuj devas lerni la anglan?

- 5 Maria diris, ke Japanoj estas tre laboremaj. Ĉu vi samopinias?
- 6 Ĉu estas vere, ke komputiloj plialtigas senlaborecon?
- 7 Ĉu estas fakto, ke ju pli oni praktikas E-on, des pli oni flue parolas?
- 8 Kaj male, ĉu estas fakto, ke ju malpli oni uzas E-on, des malpli oni flue kaj bone parolas?

- 9 Ĉu estas certe, ke laboristoj kiuj laboras multe ĉiam perlaboras pli da mono ol tiuj kiuj ne estas tiel laboremaj?
- 10 Ĉu tio estas vera, ke Usono gajnis la mondan futbalmatĉon?
- 11 Ĉu ŝajnas al vi, ke kiam iuj diras, ke la angla lingvo solvos la internacian komunikadan problemo, ili troigas?
- 12 Laŭ vi, kiu estas la plej belaj viroj kaj virinoj en la tuta mondo?

- 13 La plej bongusta trinkaĵo estas kokakolo. Ĉu mi pravas aŭ malpravas?
- 14 Ĉu ŝajnas al vi, ke estas varme ĉi tie? Aŭ kontraŭe?
- 15 Mia opinio Esperanto estas tre interesa lingvo. Kaj via opinio?
- 16 La BEKkurso estas pensiga kaj utila. Ĉu vi opinias tute same kiel mi?

- 17 La plej bela sezono estas vintro. Ĉu vi konsentas kun mi pri tio, aŭ ĉu vi havas alian opinion?
- 18 Oni diras, ke “kiom da homoj, tiom da gustoj.” Ĉu vi samopinias?
- 19 Ĉu estas fakto, ke la suno pli brilas en Nordafriko ol en Nordeŭropo?
- 20 Ĉu mi pravus se mi dirus, ke la tero ne estas ronda sed plata?!

- 21 Serpentaĵo estas pli bongusta ol kokinaĵo, ĉu ne?
- 22 Fromaĝo estas pli bonodora ol parfumo, ĉu?
- 23 Ĉu vi opinias, ke oro estas pli multekosta ol arĝento aŭ male?
- 24 Ĉu multfoje estas vere, ke “Kia patro, tia filo”?